

Radio Ĉerizo 14

2011-10-08

Radio Ĉerizo hodiaŭ sendas la voĉojn de la kongresanoj de la Komuna Kongreso Japana kaj Korea. Do, aŭskultu iliajn voĉojn:

"Mia nomo estas Komoto Jasuhiro, venis el la urbo Ikoma, Ikoma estas en la gubernio Nara; impreso pri tiu ĉi kongreso, la loko, la konstruaĵo estas bona, loko estas sufiĉe vasta kaj bela. Do, mi estas kontenta en tiu ĉi kongreso."

"Saluton! Mi estas koreo, kaj nomo estas Ĉo Mjongâ. Mi tre ĝojas konatiĝi kun multaj japanaj esperantistoj, kaj deziras sukcesan kongreson. Dankon."

"Mi nomiĝas Morikaŭa Kazunori el Kĵoto, Japanio. La kongresejo estas tre granda kaj bela, kaj la kongreso estas tre bona, mi pensas. Dankon."

"Saluton! Mia nomo estas Jamakaŭa Secuko, mi venas el Tokio, Japanio. Mi unuan fojon vizitas Koreujon, kaj mi tre ĝuas la kongreson, Komunan Kongreson de Koreio kaj Japanio. Kaj mi tre dankas pro la preparo kaj realigo de koreaj esperantistoj. Dankon."

** personaj nomoj estas skribitaj laŭesperante.*